This work by the famous author was first published in English in March, 1934, and then created a sensation. The Esperanto edition, like the English one, is a luxurious production on imitation Japon vellum, cloth bound, and with illustrations by many great painters. It is an ideal gift book.

Price 6/-, postage 6d.



ORDER FROM THE B.E.A.

OUR BOOKSHELF

Books starred are stocked by the B.E.A. Others should be ordered not from the B.E.A., but from the address given.

POSTAGE EXTRA.

***Tri Homoj en Boato (por ne forgesi pri la hundo).**—Jerome K. Jerome. Trad. G. Badash. 256 pp. Bind. 6s. 6p., bros. 5s.

La aventuroj de Georgo kaj Harris kaj Montmorency kaj Onklo Podger estas familiaraj al preskaŭ ĉiu anglo, kaj *Literatura Mondo* bonege elektis, prezantante al ni la nunan volumon. La tasko traduki libron tiel tipe anglan en lingvon internacian tute ne estas facila, kaj mi komencis ĝin legi kun iom da timo; ĉar jam aperis tro da tradukoj el la angla, kiuj klare montris, aŭ, ke la tradukinto ne bone scias la anglan lingvon, aŭ, ke li ne plene posedas Esperanton. Sed baldaŭ mi trovis, ke mia timo estas senbaza. S-ro Badash bonege plenumis la taskon. La burleskaj rakontoj, la tuſoj de kvieta humoro, la sentimentalaj monologado batose rompita de io ŝoka aŭ ridiga, kiu ŝetas la revanton denove sur la krudan teron, kaj la aliaj karakterizaĵoj de la libro—ĉio estas tie; kaj li tiel sukcesis kapti la spiriton de la libro, ke oni tute ne sentas, ke oni legas tradukon. Malofte mi legis Esperantan verkon kun tiom da plezuro, kiom donis al mi la nuna volumo.

Entute S-ro Badash skribas laŭ maniero samtempe klasika kaj moderna: fundamenta, flua, kaj natura. Li havas la nuntempe maloftan kuragón nomi *vagonaron*, kaj skribi Zamenhofe *mi amus logi tie*; kaj li evitas la plimulton el la modaj eraroj kaj strangajoj kiuj makulas multajn lastatempajn eldonajojn.

Tamen li ne timas uzi necesajn teknikajn terminojn el la ĉiutaga vivo: *jufto, kejlo, kaj mortezo; cepo kaj limono, junko kaj karekso; bumo, floti, flusi, kaj lofi; asterio, fokseno, gobio, kardio, leŭcisko, kaj ploto.* Oni do povas miri pri *landkarto* kaj *kreskaj-barilo* anstataŭ *mapo* kaj *hego*. *Faktoto* (=a *factotum*) kaj *zimozo* (=zymosis) ne troviĝas en ĉiu vortaro.

Da kritikindajoj estas malmultaj, kaj el ili kelkaj estas aferoj de gusto. Kial ne *Tri Viroj en Boato?* *Po ok ŝilingojn* estas eraro: oni skribu *po ok ŝilingoj*. Pli bona ŝajnas *Elizabeto* ol *Elizabeta*; ĉar oni ne povas facile adjektivigi la nomon *Elizabeta* (*Elizabetaa?*). *Reĝino Elizabeta* por mi signifas *an Elizabethan queen*, kaj ne *Queen Elizabeth*. Estus tre interese scii, ĝis kiu grado alilandano aprobus la anglan uzon de *vi* (anst. *oni*) kiun ĝis nun oni ĉiam evitadis

(ekz., 16, 76, 103, 104, kaj tra la tuta libro). (Ekzemplo estus la frazo el mia unua paragrafo supre, skribita *kaj vi tute ne sentas, ke vi legas tradukon*). Aŭ komprenus la diiron *Mi estas benita*, se 130.

Mi proponas la enkrampajn ŝangojn: *vulgara* (*vulgarača*) 25; *dekdua* (*dek-dua*) 53; *dentpudro* (*dentpulvoro*) 35; *daŭris pensi* (*daŭre pensis*) 87; *daŭrus dormi* (*dormadus*) 135; *vi ne zorgus, se* (*vi ne protestus, se, aŭ ne vin ĝenus, se*) 95; *plenajn* (*maksimume*) *dek minutojn* 123; *kirlanta* (*kirliĝanta*) 127; *opinianta tre stranga tion, ke* (*mirante, ke*) 136. Mi alimaniere uzus la vortojn *certa, sugestii*, ol kun la signifoj *iu kaj aserti* (aŭ *supozigi*). Kaj kio estas *meza kristano*?

M. C. B.

Samideana Vortaro.—Julie Ŝupichova. 20 pp., unu respondkupono, ĉe Ant. Prazak, Jablonne n.Orl., Ĉeĥoslovakjo.

Kolekto de 160 "samideanaj pensoj"—la frukto de preskaŭ tridek-jara sperto en nia movado. Jen tri: *Koni Esperanton povas multaj. Sed scii?*—*Skribi en Esperanto: afero evidente facila. Sed skribi internacie?*—*Fratoj amataj, kie vi estas? kion vi faras?* *Kion dirus hodiaŭ al ni la Majstro?*

Vilao apud la Maro. En la Tombejo.—48 pp., du respondkuponoj. Ĉina Mondlingva Librejo, Peipino.

Du rakontoj de G. P. Stamatov, kun Esperanta traduko de I. H. Krestanoff kaj ĉina traduko de Kinkeno, en paralelaj kolumnoj. Ni ĝojas vidi la naskiĝon de ĉi tiu nova Biblioteko, kaj deziras al ĝi plenan sukceson.

Marŝalo Jozef Pilsudski.—W. Sieroszewski. Trad. B. Strelczyk. 53 pp., ĉe Pola Esperanto-Asocio, Lubicz 34, Krakow.

Biografio de la antaŭnelonge mortinta nacia heroo, kun bona portreto, kaj klarigaj historiaj notoj. Tre interesa por ĉiu studento de la historio; ankaŭ por ĉiu, kiun interesas la vivo de homo kuraĝa kaj mond fama. Verko serioza kaj konservinda.

***Esperanto in the School.**—This is the title of a new leaflet published by the B.E.A. It summarizes in four pages the educational value of Esperanto, and is just the thing to send to anyone in touch with any form of educational activity. Price: 4d. doz., 2/6 100.

***B.E.S. Adresaro de Esperantistoj Ĉiulandaj**
—12-a eldono, por la jaro 1935-6). 88 pp.,
1s. 6p.

Jen la lasta eldono de ĉi tiu konata adresaro. Ĝi enhavas nomojn kaj adresojn de 1154 Esperantistoj en diversaj landoj, kun multaj detaloj pri ĉiu, laŭ zorge elpensita sistemo de mallongigoj, kiu ebligas la enmeton de multe da informoj en malmulta spaco. Kun 80 portretetoj.

***La Morea Perlo.** (*Ideala Esperanta Biblioteko N-ro 2*). D. Simson. Trad. el la nederlanda R. Delpasko. 223pp., 1s. 9p.

Kiel sia antaŭulo *Blua Sango*, ĉi tiu volumo estas malkara kaj rekondinda distraĵo por fervoja vojaĝo, sen pretendi al klasikeco aŭ stilo altnivela; tamen ne sen meritoj. Ĝi estas legaĵo simpla kaj interesa, kaj sufice fluas (aparta trajto estas la ofta forlaso de la subjekto por vivigi la stilon—ses ekzemploj troviĝas sur la unua paĝo). Interesaj esprimoj: *mi forparolas mian tempon*; *la vojo tienas*; *mi lin venpetos*; *lia nazo preskaŭ stumpis*; *la telefono rinkis*; *li kvazaŭas (sajnigas)*. Troviĝas tro da eraretoj: *ĉe (=al)*; *oferi (=proponi)*; *nura ("mere")* kun la signifo *sola ("only")*; *nerespondeble (=malsage)*; *renkonten (=renkonte)*; *ĉu jes?* (*=ĉu ?*); *jes (=ja aŭ efektive—"mi jes supozas")*; *ne jam (=ankoraŭ ne)*; *deformita (=misformita)*; *finis (=finiĝis)*; k.s. Eĉ en libro efemera oni povas esperi iom pli da zorgo pri lingva ĝusteco. Preso kaj papero bonaj.

Sub la Signo de l' Espero.—63 pp., prezo ne montrita. *Heroldo de Esperanto*, 94 Brüsseler-str., Köln.

Kolekto de konkursprovaj noveletoj kaj rakontoj el la Esperantista vivo. Ni citu el la Antaŭparolo: "La noveletoj ne pretendas specialan literaturan valoron: kelkaj estas eĉ iom naivaj. Tamen kiel tutajo ili prezentas beletan bukedon da skizoj pri la pensoj, deziroj, sapiroj, ĝojoj, kaj seniluziigoj de nia samideanaro en diversaj landoj kaj kontinentoj."

Gvidlibro por la ekzamenoj de S.F.P.E.—*Kompilis Prof. G. Waringhien, Prezidanto de Franca Esperanto-Instituto.* 64 pp., 4.50 fr. fr., ĉe F.E.I., 47 rue de Douai, Lille, Francujo.

Plejparte kolekto da teksto por traduko Esperanto-francen, aŭ franc-esperanten, kun specimenaj demandoj. Ĝi utile liveras egale al kandidato kaj ekzamenisto klaran ideon pri la lingva nivelo celenda. Sed kial enmeti pecon, kiu certe ne estas en Zamenhofa Esperanto, kiel ekzamenan tekston?

***Cu gi estas nur Fabelo?** — Jan Wolski.
Tradukita de Roman Dabrowski. 172 pp.,
Esperanta Eldon-Kooperativo, Al. Jerozolimskie 101, Varsovio. 4s. 6p.

Libro en la formo de interesa rakonto pri kaj por-infana, kun multaj ilustraĵoj. Ĝi priskribas la fondon de infana kooperativo, kaj la ĉiam kreskantajn bonojn kiuj sekvas el tio. Ĝi celas propagandi la infankooperativan movadon, kiu efektive ludas gravan rolon en Polujo hodiaŭ. De nuntempa realajo la rakonto transiras al estonta utopio, kaj laŭ maniero tre efika pentras la kooperan idealon. Interalie la libro akcentas la gravecon de Esperanto kiel internacia komprenilo. La verko jam atingis grandan famon en Polujo. La nuna traduko estas farita el nova teksto plibonigita de la aŭtoro mem. La stilo estas simpla kaj alloga—la aŭtoro evidentemente amas kaj komprenas la infanojn. La traduko estas bona; sed makulita de difektetoj, kiuj iom ĝenas leganton kritikeman. Oni trovas, ekz., *deposit* kun diversaj signifoj (*de, post, dum, jam de*); *ĉu* kun signifo *aŭ* (IX) aŭ *kaj* (X); *ĝus* kun signifo *ĝuste* (23) kaj *nun* (1); *ĝis kiam* (*dum*) 1; *vi fluus (flotus) sur ĝi* 21; *songi (revi)* 50; *tradukita per (de)* Grabowski 153; *mi timas, ĉu ni sukcesis (mi demandas al mi, ĉu . . . , mi ne scias, ĉu . . . , mi timas, ke mi ne . . .)* XI; oftan mislokon de *nur*, kaj ŝanceligon inter *kooperatismo* kaj *kooperativismo* (kial ne *kooperismo*?). Tamen, libro entute tre rekondinda.

La Paco.—Kvarpaĝa traktaĵo pri la ebleco trovi veran pacon en mondo maltrankvila. Bona traduko. Senpage ricevebla ĉe la tradukinto, F. W. Hipsley, 16 Broadway, Codsall, Wolverhampton.

Esperanta Kantareto.—*Finnaj religiaj kaj popolaj kantoj.* Kolektis H. Salokannel. 16 pp., 3 fmk., ĉe presejo de Ilkka en Vasaa, Finlando.

25 kantoj diversspecaj (sen muziko) por gajigi la kunvenojn de la finlanda samideanaro. Kvalite ili egalas al la ordinara nivelo de tiaj tradukoj: t.e., ili estas mezbonaj, sed ne geniaj. Ne mankas kritikindajoj (kion signifas *duki, delekti*?). Tamen oni ordinare ne atendas altan nivelon de poezieco ĉe tiaj kolektoj, kiuj malgraŭ tio povas utili por sia celo.

Orso.—*Rakonto de Henryk Sienkiewicz*, tradukita de A. Oberrotman. 31 pp., ĉe *Heroldo de Esperanto*, 94 Brüsselerstr., Köln, Germanujo.

Ĉi tiu libro ne estas aĉetebla, sed *Heroldo* ĝin donacas al abonantoj kaj klientoj, kiuj povas ĝin ricevi kontraŭ unu respond-kupono por pako kaj afranko.

***La Juno Vivo.**—*Monata Organo por la Junularo. Unua jarkolekto, 1934/5, 196 pp. Broš. 3s.*

This is a monthly magazine for young people between 10 and 16 years of age, published in Holland. It can be wholeheartedly recommended to teachers with young pupils, as it provides that wide variety of matter which is needed to keep their mercurial interest. The stories are short, and are consequently eminently suitable for rapid reading in class; and even the most backward pupil can tackle them without the fear that by the time he has reached the end he will have forgotten the beginning! Some of the stories are perhaps a little too obviously didactic for this generation, but this is a minor fault which, though commented on by my boys, has caused them no discomfort.

In addition to the stories, the book contains anecdotes, rhymes, riddles, songs, and many illustrations. In fact the magazine is very well illustrated for its size. Especially interesting and useful is a series of "stories without words," which can be used for composition.

I am particularly pleased to note that contributions come from many different countries. This brings home to young pupils the practical usefulness of Esperanto as a bridge between the nations. My boys were quick to point out that but for Esperanto their chances of reading stories by Dutch, German, or Czech writers were very slight.

Finally the book contains a series of picture lessons on the direct method which will be useful with beginners.

R. F. PARKER.

***Irisis.**—*Henry T Sas. El la nederlanda lingvo tradukis P. Ch. M. van de Vijver. Ideala Esperanto-Biblioteko N-ro 3. 191 pp., 1s. 9p.*

Pri ĉi tiu volumo oni povas ripeti ĝenerale tion, kion oni jam diris pri ĝiaj antaŭuloj: ĝi celas provizi facilan distrajon je malkara prezo. Diri, ke ĝi estas literaturo senvalora ne estas grava mallaudo, ĉar literaturan valoron ĝi ne pretendas. Lingve ĝi estas iom pli altnivela ol siaj antaŭuloj: la ĉefaj eraroj estas konstanta misuzo de la prepozicio *po*, kiun vorton la tradukinto ne komprendas; kaj la uzo de *nura* (=mere) anstataŭ *sola* (=only). La angla *satin* estas en Esperanto *atlaso*, ne *sateno*; *multipli* estas dube plibonigo de *multe pli*; kaj *smirpano* ne estas alloga esprimo por *bread and butter*.

La historio estas neniel verŝajna. Temas pri angla milionulo, kiu hontas pri sia nacieco kaj volas ŝajnigi sin arabo; pri Londono tiel ne rekonebla por la Londonano kiel la rivero *Theems*; kun boatado sur kloako nekovrita, en kiun oni ĵetas la malpuraĵojn elfenestre; krimulaj stratoj, en kiujn polican timus eniri, signitaj kiel danĝeraj per koloritaj lampoj; kaj subtera fabrikejo sekrete subtenata de angla lordo. Tiaj absurdajoj estas tiel nelaŭvivaj, ke ne estas facile senti pri ili intereson.

Gramatiche, Vocabulari, ed Esercicis di Lenghe Internaciona Esperanto.—*A. Tellini. 32 pp., 2 liroj. Ĉe Esperanto, Piazza Vittorio Eman. 9A, Udine, Italuo.*

Gramatiko en la lingvo friula, kun vortaro Esperanto-friula. Bonvena aldonon al la lernolibroj en lingvoj malgrandaj: inda fratino al la ŝlosilo ladina. Efektive, friula ŝlosilo, sed ne en ŝlosila formato.

Katalogo de Eldona Societo Esperanto, *Stockholm, Box 698, Svedujo.* Svedlingva ilustrita katalogo, 22 pp., kun konciza priskribo de ĉiu libro. Eldono de 10,000 ekz.

Folkloro kaj Kolektivaj Esploroj per Bonvolaj Informantoj.—*A. Varagnac. 8 pp., prezo ne montrita. Ĉe Presejo Union Républicaine, 27 Rue d'Orfeuil, Chalons-sur-Marne, Francujo.* Studaĵo pri la utileco de folkloro studio, kun klasifiko kaj priskribo de ĝia kampo.

Frateco (Frataro?) de la Nova Vivo.—*Generala Informado. Eldonis Tutmonda Institucio de la Nepersona Vivo, 4 Rue Lamande, Paris 17, Francujo. 16-paĝa brošuro. Prezo ne montrita.*

Afero interesa, sed iom nebula; temas pri F. N. V., fako de T.I.N.V., kiu sub la devizo *Pensi estas Krei* celas per koresponda kurso kaj alimaniere, sendepende de ligo religia, politika, aŭ komerca, meti siajn adeptojn sur la vojon al feliĉo kaj vero.

War Resistance.—*William Floyd. 23 pp., prezo ne montrita. Ĉe War Resisters' International, 11 Abbey Rd., Enfield, Middlesex.*

Forlasante nian ĝeneralan regulon recenzi neniu libron, kiu ne havas rektan rilaton al Esperanto, ni simple diras, ke ĉi tiu pledo por militrezisto estas rimarkinde trafa, ĉiuflanka, kaj objektiva. Des pli mirinde estas, ke, listigante la kaŭzojn de milito, la aŭtoro nenion diras pri la influo de lingvaj baroj. Espereble la W.R.I., kiu jam eldonas bonegan bultenon en Esperanto, eldonos ankaŭ ĉi tiun brošuron en nia lingvo, antaŭe foriginte la cititan mankon.

LA INTERNACIA FUMAJO!

Cigaredo Esperanto

(THE ESPERANTO CIGARETTE)

THESE CIGARETTES ARE WARRANTED
HAND-MADE FROM A BLEND OF THE
PUREST VIRGINIAN TOBACCOS, AND
EVERY PRECAUTION IS EXERCISED IN
THEIR PREPARATION TO ENSURE A
UNIFORM AND HIGH-GRADE ARTICLE.

Price, per packet of 20, 1/6, post free.
for 10 packets, 14/-, post free.

OBtainable from the B.E.A.

SOLE PROPRIETORS:

BUCHANAN, SCOTT & Co.,
Glasgow.

(WHOLESALE ONLY).



WINTER IS HERE

WITH THE LONG DARK NIGHTS.

**UTILIZE THEM
PROFITABLY**

BY ENROLLING NOW FOR ONE OF THE

**"Standard"
Correspondence
Courses**

IN ESPERANTO.

**Preliminary - Advanced - Translation
— the new Literary Service (your
own efforts corrected by experts).**

*Prospectus of any Course
post free on request.*



BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION,
142, HIGH HOLBORN, LONDON, W.C.1.



*Bela!
Granda!!
Interesa!!!*

Gösta Berling

Romano de Selma Lagerlöf

(Nobelpremiitino)

Trad. Stellan Engholm.

Rave ilustrita de Einar Nerman.

"La libro estas valorega, ni montru,
ĉu ni valoras la aperon de tiaspecaj
libroj."

(Informoj de Esp. Asoc. de Estonio).

". . . Granda verko kaj granda
tradukinto. Nur gratulon ni povas
esprimi."

(Kataluna Esperantisto).

Prezo:
broš. 8s., bele bind. 9s. 6p. (afrankite).

Aĉetebla ĉe:
BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION,
142 High Holborn, London, W.C.1.

MOVADO FEDERACIA

North Eastern.—Zamenhofa Konferenco kaj Festo okazos Decembro 14, je 3.15, ĉe la Bensham Settlement, Bensham Rd., Gateshead. Publika Kunveno : 6.30.

Scottish.—La 31a Skota Kongreso okazos en Callender je 15–18 Majo. La Edinburga Societo faros la aranĝojn. Oni intencas ploftigi la aperon de la Federacia Bulteno.

South-Eastern.—La kunveno en Brighton je 19 Oktobro bone sukcesis. Post vagado kaj bona temanĝo okazis vigla diskuto pri la trijara plano. Oni kolektis £1 por la Jubilea Kaso. Poste sekvis koncerto, kun teatraĵoj de la grupo en Brighton, kaj unu de la grupo en Croydon (kiun verkis F-ino Fortey). Ĉeestis c. 50.

Yorkshire.—Proksima konferenco kaj ĉiu-jara kunveno ĉe St. John's Schoolroom, Mark Lane, Leeds, Jan. 11. Kunveno 3.30, temanĝo 5.30. Je la 7a, sociala vespero aranĝota de la Leeds grupo. Bileto por la tuta afero, 1/6d. Venu grandamase kaj plenigu la ĉambron.

MOVADO GRUPA, LOKA

Alford.—Fondigis Alford Esperanto Club. Prezidanto : A. W. Leftwich, D.B.E.A. Sek., S-ino A. M. Graves, 53 West St., Alford, Lincs. Kunvenoj lunde, 7.0, ĉe la Council School. Kotizo 5s.

Birmingham.—La unua kunveno de la nova klubo nomita "Birmingham and District Esperanto Club" okazis la 1-an de Novembro, kiam S-ro P. L. Wright, prezidanto de la B.E.A., interese parolis pri la temo "Se mi estus la Ĉefministro". Vigla diskutado sekvis, kaj oni eltrovis ke Esperantistoj povas amike batali. Ni esperas ke Esperantistoj vizitantaj la urbon uzos la Kafejon, por ke ĝi iĝu Esperantejon.

Birmingham and District Esperanto Club.—Kunvenoj okazas ĉe St. Edmunds Cafe, Edmund Street, Birmingham je la 8-a vendrede, Decembro 6-a, Feb. 28, Mar. 27, April 24, ne forgesu la datojn ! Detaloj haveblaj de la sek., F-ino E. Prince, 84 Linden Road, Bournville, Birmingham.

Blackpool.—Unu el la afišoj eldonitaj de la organizantoj de la Blackpool Musical Festival estis presita en Esperanto, kaj montrita sur ĉiuj tramveturiloj en la urbo. La sekretario de la organizaco raportas, ke li ricevis gratulojn el ĉiuj partoj de la lando, kaj eĉ el Svedujo. Li kore dankas al ĉiu kiu skribis al li.

Bournemouth.—Tre sukcesa propagandkunveno je la 9a Nov. Prezidis la Urbestro kaj kelkaj lokaj eminentuloj subtenis. S-ro Butler faris propagandan paroladon kaj donis specimenan lecionon. La grupo esperas varbi multajn novajn membrojn. Nova kunvenejo : Hollywood Rest, apud Grand Cinema, Westbourne ; merkrede, 7.30–9.30.

Brighton.—Nova Kunvenejo : Union Institute, Room 4, Queen's Square.

Dublin.—Je la duonjara kunveno de la Katolikaj Esperantistoj de Irlando, 22 Okt., S-ro J. Donohoe priskribis la morton de la Reĝino de Belgujo ; S-ro Sean O hEideain (Naas) komentis pri Irlandaj naciaj karakterizaĵoj ; S-ro L. O. hUiginn parolis pri la minaco de nova mond-milito, kaj S-ro T. Ledwidge pritraktis la eblecon de estonta flugado al aliaj planedoj. La tutaj kunvenoj okazis en Esperanto.

Edinburgh.—Dec. 4, Ĉu la mondo pliboniĝas ? 11, Zamenhofa nokto. 18, Rondkantado. 25, Kristnaska Festkunveno.

Glasgow.—Dec. 2, Visto (1s.) 9, Aŭkcia vespero. 16, Zamenhofa vespero.

Grimsby.—Dec. 2, La suno. 16, La Roma kongreso.

Letchworth.—Pri la nova kurso anoncita en la Oktobra numero oni skribas : "Dum tri jaroj la Esperantaj Kursoj okazis sen oficiala subteno, pro kontraŭeco de la Loka Edukada Komitato. En tiu tempo, tamen, ili havis 32 sukcesojn ĉe R.S.A. ekzamenoj, dum aliaj lingvo-kursoj nur unufoje provis, kaj havis 8 sukcesojn. Pro tio oni devis ŝangi la sintenon."

40 infanoj lernas en la Kooperativa Halo, sub F-ino S. Reade.

London Club.—Dec. 3, Lumbilda Prelego. 5, La Eterna Serĉado. 10, Danco (9p.). 12, Ratoj, Pedikoj, kaj Historio. 17, Zamenhofa Tago. 19, Festa vespero. 24, 26, Neniu kunveno. 31, Novjara Karnavala Danco (1s. 6p.). *Vagadoj* : Dec. 8, Addington, Warlingham, Sanderstead. 22, Dorking, Betchworth.

London.—Diservo en Esperanto okazos en la preĝejo St. Ethelburga, Bishopsgate, 8 Dec., je 3.30, kiam parolos S-ro W. Sharp.

London, Elephant and Castle.—La Ligo por Internacia Frateco (International Friendship League) okazigas Tekunvenon ĉiuvinde de dum la tuta jaro, ĉe A.B.C. Restoracio, Newington Causeway, apud la Tubstacio, 6.0–7.15. Sekvas internacia parolado. Oni kore invitas ĉiun Esperantiston, kaj invitas kunlaboron.

London, North.—Dec. 6, Debato. 13, Kelkaj spertoj miaj. 20, Libera. 27, Neniu kunveno.

Manchester.—Manchester and District Esperanto Union. Okt. 3, F-ino A. Hogg parolis pri la kongreso en Romo. Je Okt. 14, S-ro Ernest Hallop (Estonujo) parolis en Esperanto al la studentoj pri arto en Salford Technical School pri "La Arto en Estonio". Je Nov. 7, Prof. Collinson parolis al bona ĉeestantaro pri "Idiotismoj de la Lingvo Internacia".

La jenaj kursoj nun funkciias.

Stretford.—Public Hall, Chester Rd., Lunde 8.

Fallowfield.—Portland Road Schools, Marde 8.

South Manchester.—109 Cecil St., Greenhayes, Merkrede 8.

Je 5 Dec., 8.0, en Manchester Social Club, Lower Mosley St., D-ro S. Whitaker prelegos pri Reumatismo.

Newport.—Kurso sub S-ro Aldworth en Stow Hill High School, marde, 7.30, sub aŭspicioj de la W.E.A.

Nottingham.—Esperanta Diservo okazos la 15an Dec. je 3.30 ĉe Friends' Meeting House, Friar Lane. Predikos Pastro Robson, Chesterfield. Monkolekto por Esperantistaj Blinduloj. Komuna temanĝo kun diskuto "Oxford Group Movement", 4.30, Friends' Schoolroom, 1/6d.

Oxford.—Dec. 3, Kantvespero. 10, Teatraĵo. 17, El la ĉapelo. 24, Kristnaskaj kantoj. 31, Novjara Festo.

Paisley.—Kurso sub la loka Edukada Komitato komenciĝis 24 Oktobro en Paisley Grammar School. Ĉeestis 21. Instruisto : S-ro R. Stevenston. *Grupa Programo* : Dec. 3, Italuo. 17, Letervespero.

Portsmouth.—Je 12 Oktobro la grupo donacis horloĝon al S-ro M. Cowan kaj F-ino Sealey, okaze de ilia geedziĝo.

Reading.—Nova Sek., S-ro W. T. Allen, 379 London Rd. Oni kunvenas en la Ĝardendometo ĉe la angulo de London Rd. kaj Donnington Rd., jaude, 7.30.

Romford.—Dec. 2, Viva Gazeto. 9, Zamenhofa Vespero. 16, Lexicon kaj Kanugo.

St. Helens.—Dec. 3, Divena Ludo. 10, Esperanto kiel helpilo al lerno de la angla lingvo. 17, Zamenhofa Nokto.

Sheffield.—Je 13 Dec., S-ro E. Gardiner parolos pri Libertempo en Danujo, ĉe 278 Western Bank, je 7.45.

Sunderland.—Fondigis grupo, kiu kunvenas ĉiujaude ĉe 32 West Sunniside. Sek., J. Hindson,

OFFICIAL NOTICES

President : P. L. Wright.
Hon. Secretary : Bernard Long, B.A.
Hon. Treasurer : W. A. Gething, B.Sc.
Secretary : C. C. Goldsmith, F.C.I.
Propaganda Secretary : M. C. Butler, M.R.S.T.

NEW MEMBERS.

Barfoot, Gertrude E. E.	<i>Heanor, Nr. Nottingham.</i>
Berman, Hilda	<i>Bath.</i>
Bradley, Violet	<i>Nottingham.</i>
Brown, Walter B.	<i>London, S.W.2.</i>
Burnham, Harry	<i>W. Hartlepool.</i>
Carr, Gladys	<i>Beeston.</i>
Chambers, Alice C.	<i>Hartlepool.</i>
Churchill, Ethel E.	<i>Derby.</i>
Clack, Mary J.	<i>Bath.</i>
Clewe, John F.	<i>Los Angeles.</i>
Crozier, Winifred M.	<i>Sutton.</i>
Dodson, Herbert	<i>Willaston.</i>
Dunne, William J.	<i>Waterford.</i>
Ferriman, Miss K.	<i>Orpington.</i>
Forte, Antonio	<i>Weymouth.</i>
Foster, Belle	<i>Buckhaven.</i>
Fox, Dorothy C.	<i>Downderry.</i>
Frankenburg, Lucie	<i>Sunderland.</i>
Gaskell, Doris A.	<i>Britannia, Nr. Bacup.</i>
Gibbons, Doris	<i>Southport.</i>
Gildersleeve, Gregory S.	<i>Hastings.</i>
Goodacre, Alfred	<i>Barking.</i>
Green, Dorothy G.	<i>London, S.W.18.</i>
Halstead, J.	<i>Royston.</i>
Herbert, Thomas G.	<i>London, E.17.</i>
Holton, Frederic W.	<i>Glasgow.</i>
Hood, Miss R.	<i>Hartlepool.</i>
Hussey, Agnes M.	<i>Ilford.</i>
Hutchinson, Doris	<i>Halifax.</i>
Hymans, Louis L.	<i>London, S.E.26.</i>
Jenkins, Mrs. Gladys M.	<i>New Earswick, York.</i>
Jones, Edwin R.	<i>Glasgow.</i>
Jones, Rev. J. Alwyn	<i>Alford.</i>
Jones, Jack W.	<i>Old Hill.</i>
Kennard, P.	<i>W. Wickham.</i>
Kenyon, Mary K.	<i>Blackburn.</i>
Kerr, Mrs. Margaret M.	<i>Alford.</i>
Kiplinger, John L.	<i>Morgantown, U.S.A.</i>
Lambert, Emily	<i>Rochdale.</i>
Langley, Ernest G.	<i>Aylestone.</i>
Laws, Olivia M.	<i>Birtley.</i>
Lawson, J. J.	<i>Chester-le-Street.</i>
Leahy, Patrick	<i>E. Perth, W.A.</i>
Lewty, Rev. Harold A.	<i>Ipswich.</i>
McKenzie, Alexander	<i>Humbledon.</i>
McLean, A. G.	<i>Newport.</i>
MacDonald, Hugh L.	<i>Paisley.</i>
MacDonald, William R.	<i>Paisley.</i>
Matthews, Stanley	<i>Huyton, Nr. Liverpool.</i>
Michael, Leslie	<i>Darlington.</i>
Newton, Mary	<i>Hartlepool.</i>
Percival, Kathleen	<i>Upminster.</i>
Pilling, John R.	<i>Bolton.</i>
Renshaw, Mrs. Isabel	<i>Southport.</i>
Ridings, John	<i>Bury.</i>
Robertson, William	<i>Hornchurch.</i>
Roycroft, Mrs. Jessie E.	<i>Dagenham.</i>
Sankey, William G.	<i>Romford.</i>
Scriven, C. Roy	<i>Romford.</i>
Senior, James W.	<i>Sheffield.</i>
Shearmur, Thomas	<i>Upminster.</i>
Smith, Mrs. Avis E.	<i>Kettering.</i>
Smith, Henry B.	<i>London, S.E.16.</i>
Southam, Joseph W.	<i>Bp. Auckland.</i>
Temple, Ada	<i>Bp. Auckland.</i>
Tillson, Mrs. M.	<i>Northampton.</i>
Trinder, Florence L.	<i>Leigh-on-Sea.</i>

Wade, Stanley A.	<i>Halifax.</i>
Waite, Leonard	<i>Whitstable.</i>
Wang, Shelley	<i>London, N.W.3.</i>
Ward, Edith A.	<i>Westcliff-on-Sea.</i>
Wignal, J. W.	<i>Derby.</i>
Winch, Gwladys E.	<i>Swansea.</i>
Woolnough, Mollie	<i>London, S.W.1.</i>

NEW AFFILIATED GROUPS.

<i>Bromley</i> : Sek., S-ro C. A. Barnes, 199 Rushey Green, Catford, S.E.6.
<i>Ellesmere Port</i> : Sek., S-ro J. E. Melville, 28 Cannon Street.
<i>Halifax</i> : Sek., S-ro F. Taylor, 19 St. Ives Road.

NEW LOCAL DELEGATE.

London : VD. (Universitataj aferoj) : F. S. Leigh-Browne, University of London, South Kensington, S.W.7.

DONATIONS TO B.E.A.

General Funds : Miss E. A. Sidebottom, £1. 4s. ; Mrs. E. M. Kendrick, H. A. Padley, 5/6 ; Miss M. E. Chadwick, M. Noverraz, 5/- ; H. E. Markwick, 4/- ; I. Anderson, 2/- ; J. M. Pitt, 1/-.

Advertising Fund : Mrs. E. M. Kendrick, H. A. Padley, 5/6 ; Miss M. E. Chadwick, 5/-.

Motor Car and Propaganda Fund : Anon., £5. 3s. 6d. ; B. E. Long, Stretford Esp. Soc., 5/- ; G. Bevan, 2/6 ; Anon., 2/4.

Donation to B.E.A. Library : Dr. R. Crowley, £1.

B.E.A. EXAMINATION SUCCESSES.

L.B.E.A. : J. Farrand, *Doncaster*, kun honoro.

Diploma (D.B.E.A.) : Anthony W. Leftwich, *Alford, Lincs.*

NOMINATION OF OFFICERS, 1936-7.

Members are reminded that they have the right to nominate candidates for election as Officers and Councillors for the ensuing year. Forms of nomination may be obtained from the Secretary. Nominations should be sent in by January 18th.

EXECUTIVE COMMITTEE MEETING.

November 8th, 1935. Present : The President, Miss Blake, Miss Davey, W. M. Goodes, W. H. Matthews, A. C. Oliver, R. Robertson, Mrs. E. Warren. In attendance, the Secretary.

The date of the Council Meeting was fixed for February 1st. It was decided not to hold the usual Reunion on that night, but to arrange a dance for the Jubilee Fund. An unusually large amount of routine business was transacted.

C. C. GOLDSMITH, *Secretary.*

MORTOJ

Burn.—Je Novembro 11, D-ro G. Wilson Burn, 88 jara. Li estis Fratulo de B.E.A. kaj dum multaj jaroj laboris por Esperanto.

Young.—Je 9 Okt., S-ino Rosa Young, ĉe 27 Nicholas Rd., Barry.

Korekto.—Sur p. 172 ni diris, ke la bela maparo de Romo estas donaco de Touring-Club Italiano al la Kongresanoj. Tio estas eraro : ĝi estas donaco de la loka Kongresa Komitato.

“The Greater World” (Okt. 19) havas longan artikolon : *The Amazing Story of how the Bible was translated into Esperanto*, el la plumo de Avoto.

THE ESPERANTO STUDENT

Hon. Redaktoro: W. SEVERN.

22. NUMBERS.

The Cardinal (chief) Numbers are:—

0, *nulo*; 1, *unu*; 2, *du*; 3, *tri*; 4, *kvar*;
 5, *kvin*; 6, *ses*; 7, *sep*; 8, *ok*;
 9, *naŭ*; 10, *dek*.
 11, *dek unu*; 12, *dek du*; 13, *dek tri*;
 14, *dek kvar*, etc.
 20, *dudek*; 21, *dudek unu*, etc.
 30, *tridek*; 38, *tridek ok*, etc.

100, *cent*; 1,000, *mil*; 1,000,000, *miliono*.

Only *nulo* and *miliono* take the accusative. *Miliono* also takes the plural form *milionoj*.

The form *unuj* (some) is sometimes used.

Unuj marſis; *aliaj rajdis*. Some walked; others rode.

The Ordinal Numbers (indicating order) are formed by adding the adjective ending *-A* or the adverbial ending *-E* to the cardinals.

unua, first; *unue*, firstly, etc.

The adjective ordinals agree with their nouns in number and case.

La domoj ne havas triajn etaĝojn. The houses do not have third storeys.

23. TABLE OF CORRELATIVE WORDS.

	INDEFINITE. <i>Some, (any).</i>	K QUESTIONING RELATIVE. <i>What, which.</i>	T DEFINITE. <i>That.</i>	C INCLUSIVE. <i>Each, every, all.</i>	NEN- NEGATIVE. <i>No, none.</i>
QUALITY Kind of	IA Of some kind	KIA Of what kind	TIA Of that kind Such	CI A Of each kind Of every kind	NENIA Of no kind
MOTIVE Reason Purpose	I AL For some reason	KI AL For what reason Why	TI AL For that reason Therefore	CI AL For each reason For every reason	NENIAL For no reason
TIME	I AM At some time	KI AM At what time When	TI AM At that time Then	CI AM At each time At every time Always	NENIAM At no time Never
PLACE	IE In some place Somewhere	KIE In what place Where	TIE In that place There	CI E In each place In every place Everywhere	NENIE In no place Nowhere
MANNER	I EL In some way Somehow	KIEL In what way How As, like	TI EL In that way So	CI EL In each way In every way	NENIEL In no way Nohow
POSSESSION	IES Someone's	KIES Which one's What person's Whose	TIES That one's	CI ES Each one's Everyone's	NENIES No one's
THING	IO Something	KIO What thing What	TIO That thing	CI O Everything	NENIO Nothing
QUANTITY	I OM Some (of the quantity)	KI OM What quantity How much	TI OM That quantity So much	CI OM Every quantity All of the quantity	NENIOM No quantity
INDIVIDUALITY	IU Someone	KIU What person Which one Who Which	TIU That person That one	CI U Each person Everyone <i>Ciuj</i> = all, all the ...	NENIU No one Nobody

The word *ajn* (-ever, -soever) is sometimes used after certain correlatives to mark indefiniteness. It is never joined to the word that precedes it.

Kio ajn, whatever, whatsoever; *Kiu ajn*, whoever, whosoever, whichever; *Kiam ajn*, whenever; *Kiel ajn*, however, etc.